

La metamorfozo de la mondo

Claude Gacond, 88-a radioprelego, 1964.08.05 & 08.08

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la metamorfozo de nia mondo. Vi aŭdas Claude Gacond.

La sesan de julio Sovetio publikigis en Tokio gravan memorandon, kiu advokatas la neceson doni al Unuiĝintaj Nacioj konstantan polican forton. Tiu memorando estis abunde komentita dum la julia monato. Mi ne aldonos plian raporton pri ĝi, sed volas rememorigi al vi kelkajn aspektojn de la nuna monda evoluo.

Jam de jardekoj la esperantistaro kaj la mondanistoj asertas, ke paco ne povos kreiĝi dank'al la timo de la bomboj de la plej potencaj ŝtatoj de nia planedo, sed nur dank'al la starigo de tutmonda juro kaj de intergenta ĝentileco.

La historio de landeto, kiel Svislando, pravas, ke por ĉesigi la eternajn batalojn, kiuj dividis kaj konstante endanĝerigis la vivon de la svisaj kantonoj, ŝanĝo de konstitucio sufiĉis. Tiu ŝanĝo okazis en 1848 post grava krizo, kiu kondukis al civila milito : estis milito nomata *Sonderbund*, aparta ligo.

Antaŭ 1848 ĉiu kantono nur povis fidi je la propra armeo por asekuri ordon sur sia teritorio, sed pro la ekzisto de armeoj en la najbaraj kantonoj, kiuj ankaŭ asekuris ordon sur la propraj teritorioj, malfido kaj timo konstante ekzistis inter la tiamaj najbaroj.

En 1848 la kantonoj rezignis je parto de sia suvereneco profite al federacia registaro. La kantonoj rajtis krei por si nuran policon, kaj federacia armeo kaj federacia tribunalo estis kreitaj por solvi la interkantonajn konfliktojn kaj protekti la federacian teritorion kontraŭ la eblo de eksterlandaj atakoj. Antaŭ 1848 ekzistis 25 sendependaj ŝtatoj, kiujn ligis nur tre malforta interkantona ligo nomata Dieto. Post 1848 ekzistis unu federacio formita de 25 kantonoj. La internaj militoj ĉesis, kaj iom post iom naskiĝis tutsvisa sinteno. Estis grandega metamorfozo.

Similan metamorfozon travivas la nuna mondo. Dum unu jarcento nia planedo fariĝis multe pli malgranda, ol la eta Svislando de 1848. Tiam, antaŭ la ekzisto de la fervojoj, por veturi de Ĝenevo al Zuriko necesis pluraj tagoj, dum hodiaŭ oni povas en unu sola tago plurfoje veturi de Parizo al Tokio kaj revene, laŭ la monujo aŭ neceso. En 1848 la svisaj katolikoj kaj protestantoj devis repensi sian landbildon. La samon devas fari hodiaŭ ĉiuj mondanoj : ili devas repensi sian mondbildon, ili estu kristanoj, budhanoj, oomotanoj aŭ liberpensuloj. Por la unua fojo en la homara historio la homoj fizike sentas, ke la homaro formas tuton.

Jam de longe klarvidantoj antaŭdiris tiun epokon. Ili provis revelacii al ni sian mondbildon, kaj Thomas Moore eĉ forĝis nomon por priskribi la idealan landon, tiun de la insulo Utopio. Ni relegu liajn verkojn, kaj ni konstatos, ke la utopiaĵo de la brita profeto hodiaŭ ne plu estas revoj, sed preskaŭ realaĵoj.

Ni povas miri, kiel rapide la homoj de nia epoko sin adaptis al la novaj teknikaj instrumentoj siatempe utopiaj. Okdekjarulo, kiun ni preterpasas surstrate, naskiĝis en la antaŭ-aŭtomobila erao, kaj hodiaŭ li malpli miras pri la rapideco de la rakedoj, ol li miris pri tiu de la unuaj aŭtomobiloj aŭ aeroplanoj. Tiu okdekjarulo eble eĉ stiras propran aŭtomobilon kaj preskaŭ forgesis, kiel estis la stratoj dum lia infaneco, kiam ankoraŭ kuradis la viandaj ĉevaloj.

Kial la homoj de nia epoko ne kapablis samrapide adapti sian penson al la teknika mondo, kiel ili kapablis adapti sian korpon ? Dum ni vivas en kvazaŭ interplaneda epoko, ni pense eĉ ne vivas en la mondo. La historiistoj kaj psikologoj havos interesajn studobjektojn tiurilate. Ili verŝajne malkovros, post longaj serĉadoj, ke la homoj estus povintaj same rapide evolui pense, ol korpe, se la informado ne estus estinta unudirekta. Malfermu iun ajn ilustritan

La metamorfozo de la mondo

Claude Gacond, 88-a radioprelego, 1964.08.05 & 08.08

gazeton ; pri teknikaj novaĵoj vi vidos kaj legos abunde, sed pri intelektaj aŭ moralaj novaĵoj vi trovos preskaŭ nenion. Nia ĵus renkontita okdekjarulo eble ankoraŭ nenion aŭdis pri nia lingvo, kiu tamen naskiĝis en lia epoko, kaj la hodiaŭaj diplomatoj kaj sciencistoj ankoraŭ serĉas solvi per maŝinoj siajn interlingvajn malfacilaĵojn, kaj ĉiuj homoj iom timas pri la progresoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj eble baldaŭ estos la solaj, kiuj povos defendi la Homajn Rajtojn, sed ili konservas ankoraŭ plenan fidon en tiuj, kiuj pretigas la venontan militon. Ni estas tiuj homoj.

Sed ĉiujare la monda situacio evoluas pli kaj pli rapide. Kiu en 1959-1960 estus pensinta, ke tiom da landoj tiel subite renaskiĝus per sendependiĝo el la kolonia regado, kaj ke en 1964 el Sovetio venus alvoko proklamanta la neceson krei mondan policon. Tiu lando siatempe provis malfortigi Unuiĝintajn Naciojn kaj kontraŭstaris al la sendo de militaj fortoj en la netrankvilajn regionojn. La monda situacio tiom rapide evoluas, ke ŝtatestroj ne timas sin kontraŭdiri, dum antaŭ unu generacio necesis plejofte la morto de ŝtatestro, por ke progreseto povu okazi.

Se multaj homoj miras pri la returniĝo de Sovetio, la mondanistoj vidas en ĝi nur pruvon, ke estas neceso eĉ por la plej grandaj ŝtatoj, ke novaj organoj naskiĝu ene de Unuiĝintaj Nacioj, por ke ili fariĝu aŭtonoma organismo kapabla funkcii, kiel tutmonda registaro. Ili scias, ke super la nacioj konstruiĝas supernacio : la mondo. Per siaj studoj, kongresoj, gazetoj ili diskonigas informadon kaj kiam memorandoj aperas, ili proponas necesajn plibonigojn, kiuj permesos poste al la ŝtatestroj proklami novajn memorandojn. La mondanistoj garantias la direkton de la monda evoluo al tutmonda registaro, ĉar ili havas klaran bildon de tiu necesa evoluo, kiel la esperantistaro garantias la direkton de la lingva evoluo, ĉar ili vivas la formiĝon de interlingvo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la metamorfozo de nia mondo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-